# Esperanto

lingvo internacia

Petr Adam Dohnálek

# Ideo de neŭtrala lingvo

- dua lingvo por ĉiuj
- simpla kaj regula gramatiko
- rapida kaj facila lernebleco
- egalrajteco en internacia komunikado
- protekto de minoritataj lingvoj
- grandega ekonomia ŝparo

# Pensoj pri plenumo

- ĝis la 17-a jc. nur malmultaj informoj
  - Lucius Claudius Galenus (2-a jc.) – malnovepoka kuracisto
  - Hildegardo el Bingen (12-a jc.) – filozofino
- reviviĝo de la intereso en la humanisma tempo
  - pripensoj de la filozofoj Bacon kaj Leibniz
  - Descartes (1629)

    *La lingvo devas havi nur unu ŝablonon por konjugado, deklinado kaj kreado de vortoj… Tiuj estiĝus per prefiksoj kaj sufiksoj…*

# Kuriozaj eksperimentoj

- John Wilkins kaj George Dalgarno (17-a jc.)
  - sciencaj lingvoj, ekstreme preciza kategoriigo
  - orientiĝo laŭ klasifikaj tabeloj
- kategorio de kvarpiedaj bestoj laŭ Dalgarno

| | | |
|---|---|---|
| n | – | vivaĵo |
| nη | – | besto |
| nηk | – | kvarpieda besto |
| nηkη | – | ĉevalo |
| nηke | – | azeno |
| nηka | – | elefanto |

# Johano Amoso Komenio

- Via Lucis (1642), 19-a ĉapitro

  *Tiom da lingvoj ja estiĝis hazarde, per nura ĥaoso, kial ne ankaŭ unu per prudento kaj saĝo, per rea ĝustigo pura kaj artefarita?*

  *Se Adamo, filozofoj, metiistoj kaj ajnaj homoj ĝis nun rajtis nomigi unuopajn aĵojn, kial oni ne rajtus krei ankaŭ verbojn, partiklojn kaj aliajn frazpartojn, apartenantajn al la lingvo?*

  *Ĝenerala lingvo devas helpi al ĉiuj egalrajte. Per la Latina ni helpus nur al ni mem, kiuj jam scias ĝin, ne ankaŭ al nekleraj nacioj, kiujn ni tamen devas konsideri unuavice, ĉar ili konsistigas pli grandan parton de l' mondo.*

# Pluaj lingvaj projektoj

- 1734 – *Carpophorophilus* (Germana sennomulo)
- 1765 – *Langue nouvelle* (Joachim Faiguet)
- 1817 – *Solresol* (Jean-François Sudre)
  - vortoj kreitaj el dogamoj
  - malo fariĝis per inverto de silabsekvo

    *misol* – bono, *solmi* – malbono
  - derivado per akcentigo

    *sirelasi* – konstitucii, *sírelasi* – konstitucio, *sirelási* – konstitucia
- pliaj provoj surbaze de la Franca, Germana, Rusa lingvoj

# Volapük – mondolingvo

- 1879 – la Germana pastro **Johann Martin Schleyer** prezentis sian projekton
- unua amase disvastigita artefarita lingvo
- kreinto laŭdire inspirita de sonĝa revelacio
- disvastiĝo en Germanujo, Aŭstrujo kaj Ameriko
- 1889 – 25 gazetoj, pli ol cent mil parolantoj
- tre deformitaj Anglaj, Latinaj kaj Germanaj radikoj – nekompreneblaj eĉ por parolantoj de la lingvoj

  *bal* – unu, *tel* – du, *kil* – tri, *fol* – kvar, *lul* – kvin, *mäl* – ses

# Volapük venkata

- František Vladimír Lorenc (1890)

*Iuj kredas, ke plej bona provo estas la de Schleyer volapük kiu estas vastigita nemalmulte. Sed multaj eraroj ĝiaj ne lasas, ke ĝi fariĝos vere la mondlingvo. Schleyer elpensis laŭ sia gusto formojn kaj vortojn, kaj ŝanĝis esprimojn de nacilingvoj tiel, ke oni povas ekkoni ilin malfacile; ekzemple: advokato* lavogel, *figuro* füg, *fiziko* füsüd, *hotelo* loted, *ideo* döl, *kanalo* kanäd (kanal = *artisto!), modo* molad, *altaro* latab, *poŝto* pot, *rozo* lol…

*Multego da sonoj ä, ö, ü, dl, tl, bs, gs, ms… kaj la longegaj vortoj faras volapükon malfacilan kaj malbelan; ekz.:* dlänüb, eimatabömetobös, ovinditobödok…

# Ludoviko Lazaro Zamenhof



- Rusa Hebreo (1859–1917)
- juneco en Białystok
- ĉirkaŭita de Hebreoj, Rusoj, Poloj kaj Germanoj
- lingvan nekomprenon li konsideris ĉefa kialo de oftaj interetnaj konfliktoj → jam en la studentaĝo elpensis facilan neŭtralan lingvon por ĉiuj

# Unuaj provoj de Zamenhof

- en juneco li unue pripensadis revivigon de la Latina
- dum studado de la Angla li ekkonis, ke komplika gramatiko ne necesas por funkcio de lingvo
- ekkompreno de ebleco malmultigi vortradikojn per regula sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj

  *швейцар* ⟶ *швейцар**ская***
  *кондитер* ⟶ *кондитер**ская***


- 1878 – *Lingwe uniwersala*
  - ◇ manskribaĵon likvidis la patro de Zamenhof, instruisto pri lingvoj, konsiderinta la laboron sensenca utopio

# Fina realigo


- 1879–1885 – Zamenhof studis medicinon en Varsovio kaj Moskvo, tiutempe ankaŭ prilaboradis novan, plibonigitan lingvoprojekton
- eldonon de la jam preparita libro malpermesis cenzuristoj
- Zamenhof tradukis la Malnovan Testamenton kaj teatraĵojn de Ŝekspiro, tiel la lingvon plu plibonigis kaj ĝian vortprovizon pliriĉigis
- fine la lernolibro estis eldonita, sub la aŭtora kaŝnomo *„D-ro Esperanto“: Lingvo de D-ro Esperanto ⟶ Esperanto*

# Liber Primus – Unua Libro


Дръ ЭСПЕРАНТО.
МЕЖДУНАРОДНЫЙ
ЯЗЫКЪ.
ПРЕДИСЛОВІЕ
и
ПОЛНЫЙ УЧЕБНИКЪ.
por Rusoj
Цѣна 15 копѣекъ
ВАРШАВА.
Типо-Литографія Х. Кельтера, ул. Новолипки № 11.
1887.


Dr. ESPERANTO.
JĘZYK
MIĘDZYNARODOWY.
PRZEDMOWA
i
PODRĘCZNIK KOMPLETNY.
por Poloj
Aby język stał się powszechnym, nie wystarcza nazwać go takim.
Cena kop. 15.
WARSZAWA.
Druk. i Lit. Ch. Keltera, ul. Nowolipie № 11.
1887.


Dr. ESPERANTO.
LANGUE
INTERNATIONALE
PRÉFACE
et
MANUEL COMPLET.
por Francoj
Pour qu'une langue soit universelle—il ne suffit pas de lui en donner le nom.
Prix 50 cent.
VARSOVIE.
En vente chez Gebethner et Wolff.
1887.
704.674-B. Esp


5.
Dr. ESPERANTO'S
INTERNATIONAL
TONGUE.
PREFACE
AND
COMPLETE METHOD.
edited for Englishmen by J. St.
por Angloj
For making a tongue international it is not enough to call it so.
WARSAW.
Printed by Ch. Kelter Nowolipie Str. N. 11.
1888.

- 1887
  *Международный языкъ*
- 1887
  *Język międzynarodowy*
- 1887
  *Langue internationale*
- 1888
  *International tongue*

# Gramatikaj specifaĵoj 1

- aboco enhavas 28 literojn

  *a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z*
- ĉiu litero konformas al unu, ĉiam la sama fonemo
- akcento en ununura aŭ antaŭlasta silabo

  ***Mi ĉi**on **po**vas **fa**ri **en ti**u, **ki**u **min** forti**ki**gas.*
- ĉiuj substantivoj havas la finaĵon *-o*, adjektivoj *-a*, derivitaj adverboj *-e*

  *bon**o*** – bonum, *bon**a*** – bonus, *bon**e*** – bene
- multnombron kreas la finaĵo *-j*

  *homo* (homo) ⟶ *homo**j*** (homines)

# Gramatikaj specifaĵoj 2

- infinitivo finiĝas per *-i*, prezenco *-as*, pasinteco *-is*, venonteco *-os*, kondicionalo *-us*, imperativo *-u*

  *far**i*** (facere), *mi far**as*** (facio), *mi far**is*** (feci), *mi far**os*** (faciam), *mi far**us*** (facerem), *far**u**!* (fac!)

- sufiksa sistemo malmultigas bezonatajn vortoradikojn

| | | |
|---|---|---|
| *granda* (magnus) | → | ***mal**granda* (parvus) |
| *ŝtono* (lapis) | → | *ŝton**et**o* (lapillus) |
| *ĉevalo* (equus) | → | *ĉeval**id**o* (eculeus) |
| *domo* (domus) | → | *dom**aĉ**o* (casula) |
| *inko* (atramentum) | → | *ink**uj**o* (atramentarium) |

# Vortoprovizo 1

- plej multe da vortoj el lingvoj Latinidaj, malpli el Ĝermanaj, Slavaj kaj aliaj
- el la Latina *sed* (sed), *okulo* (oculus), *akvo* (aqua)
- el la Franca *dimanĉo* (dominica), *fermi* (claudere)
- el pluraj Latinidaj *facila* (facilis), *verda* (viridis)
- el la Germana *haŭto* (cutis), *jaro* (annus), *nur* (modo)
- el la Angla *birdo* (avis), *suno* (sol)
- el pluraj Ĝermanaj *bildo* (imago), *fiŝo* (piscis)

# Vortoprovizo 2

- el la Pola *ĉu* (-ne), *krado* (cratis)
- el la Rusa *barakti* (pugnare), *vosto* (cauda)
- el pluraj Slavaj *krom* (præter), *prava* (rectus), *serpo* (falx)
- el la Greka *hepato* (iecur), *kaj* (et), *politiko* (scientia civilis)
- el la Litova *du* (duo), *ju* (quo), *tuj* (statim)
- el la Suoma *lirli* (susurrare), *saŭno* (sudatorium)
- el la Araba *aŭ* (vel)

# Tekstomontraĵo – Patro nia

*Patro nia,*
*kiu estas en la ĉielo,*
*sanktigata estu via nomo.*
*Venu via regno.*
*Fariĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.*
*Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.*
*Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,*
*kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.*
*Kaj ne konduku nin en tenton,*
*sed liberigu nin de la malbono.*
*Amen.*

# Ĝis la dua mondmilito

- estiĝo de multaj asocioj
- Zamenhof rezignis sian postenon en la movado
- 1921 – la Universala Kongreso en Prago
- 1931–1938 – redaktejo de la Ĉeĥoslovakuja Radio en Brno elsendadis Esperante parolatajn, operajn, operetajn kaj kabaretajn programojn (ankoraŭ postmilite la stacio Prago 3× tage, aliĝis ankaŭ Ostravo kaj Bratislavo)

# Tempoj de subpremado

- problemoj kun eldonado de Esperantaj gazetoj en la Rusa Imperio dum la 1-a mondmilito, pro manko de cenzuristoj
- post alveno de la Germana faŝismo: Esperanto malpermesita kaj ĝiaj uzantoj persekutataj (Hitlero nomis ĝin lingvo de Juda konspiro)
- Stalin indikis Esperanton lingvo de kosmopolitoj
- 1952 – likvido de kuniĝoj en Ĉeĥoslovakujo

*… de la momento, kiam kamarado Lenin emfazis valoron de Esperanto por la laborista klaso, pasis jam longa tempo… kaj dume miloj da laboristoj lernas la gepatran lingvon de pioniroj de socialismo – la Rusan.*

# Gravaj historiaj okazoj

- peticion al la Unuiĝintaj Nacioj favore Esperanton subskribis post la dua mondmilito pli ol 80 milionoj da homoj
- 1954 – rezolucio de Unesko konfirmis, ke la idealoj de la Esperanta movado kongruas kun celoj de ĉi tiu organizo, instigis atenteme rigardi evoluon de tiu artefarita lingvo
- 1985 – rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko instigis la membrajn ŝtatojn al enlerneja informado pri la lingva problemo kaj Esperanto, admonis ilin pripensi eblojn eluzi la lingvon

# Disvastiĝo

- ĉirkaŭ du milionoj da parolantoj
- disvastiĝo tutmonde, pleje en Brazilo, Bulgarujo, Ĉinujo, Hungarujo, Irano, Japanujo, Kubo kaj Madagaskaro
- uzado dum vojaĝado *(Pasporta Servo)*
- religiaj, profesiaj kaj ŝatokupaj organizoj
- eldonitaj ĉirkaŭ 50 mil libroj, kaj originaj kaj tradukoj
- radioelsendoj

# Kristanoj kaj Esperanto 1

- intereso de katolikoj en la Rusa Imperio tuj post la eldono de la Unua Libro kaj vortaroj (episkopo Zerr en Saratovo, prelato Dombrowski en Kaŭnaso)
- la Franco Louis de Beaufront ekdeziris disvastigi la internacian lingvon inter katolikoj – li skribis la unuan preĝ-libron *(Esperanta preĝareto)*, kiun prezentis en 1906 al papo Pio la 10-a
- multaj pastroj lernas novan lingvon


# Kristanoj kaj Esperanto 2

- komence de la 70-aj jaroj – la Pola kardinalo Wyszyński

  *En la Dua Vatikana Koncilio la Latina suferis krizon…*
  *Dum la venonta Koncilio oni parolos en Esperanto…*

- 1991 – la Rumana episkopo Jakubinyi (ekde 1994 la ĉefepiskopo de Alba Iulia) dum la Unua Speciala Sinodo pri Eŭropo en Vatikano pledis por Esperanto kiel nova eklezia lingvo (dum la sinodo la Latina ne plu estis interpretata, anstataŭis ĝin la Rusa)
- 1994 – Jakubinyi ripetis la proponon dum la Germanaj Katolikaj Foiroj en Dresdeno

# Espero Katolika


1903-04 OKTOBRO N° I.

Espero Katolika

REVUO MONATA

«Unum ovile et unus pastor». --(*Johan X. 16*).—«Unu ŝafaro kaj unu paŝtanto».

DIREKTORO
P-o Em. PELTIER, à Cheillé
par Azay-le-Rideau (Indre-et-Loire)
FRANCE

REDAKTORO
S-o Henri AUROUX, à Portsal
par Pludalmezo (Finistère)
FRANCE

**Kosto de l'numero :** 0 fr. 30, afrankite.

**Kosto de l'abono jara :** En Francujo : 2 frankoj. Ekster — : 2 fr. 50.

Al tiu kosto aldoniĝos tiu de l'kambio poŝta. L'Eldonisto de l'Revuo prezentos la kambion en Januaro ĉiujare.

**Artikoloj.** — Ĉiu aboninto povas sub sia respondeco persona verki por E. K. artikolojn pri ki'ajn objekto. La Direktoro rezervas al si la rajton korekti la mankojn de l'stilo; sed ĉiu opinio, bone esprimita, libereme estos ricevata. Oni skribu l'artikolojn nur sur unu flanko de l'papero por ebligi la komposton.

**Universala Korespondado (U. K.).** — Abonintoj de E. K. povas komuniki al ceteraj legantoj ĉion, kion ili volas, pagante por unu vorto kvin centimojn. Vorto da pli ol dek literoj kostos duoble; — vorto da pli ol dekkvin literoj kostos trioble; — vorto da pli ol dudek literoj ne estos akceptata.

**Anonoj.** — Tuta paĝo kostos 15 frankojn; — duona paĝo : 7 fr. 50; — 4ona paĝo : 4 fr.; 8ona paĝo : 2 fr. 50; 16ona paĝo : 2 fr.

por anoncoj ripetitaj Rabatoj : por trifojoj : 10 %; — ses fojoj : 15 %; — por 12 fojoj 20 %.

**Pri l'abonoj,** sin turni al l'Eldonisto de l'Revuo : Sr Barbot-Berruer, presisto, 72, rue des Halles, Tours (Indre-et-Loire), France, aŭ al unu el niaj Rajtigitoj. Sufiĉas sendi vizitan karton kun tiuj vortoj : Adepto de E. K.

**Manuskriptoj kaj leteroj pri la redakcio** estu sendataj nur al la redaktoro. — Manuskriptoj ne redonataj estos.

TOURS. (TUR').
BARBOT-BERRUER, LIBRAIRE-ÉDITEUR
72, Rue des Halles, 72
FRANCE




- 1903 – la Franca pastro Emile Peltier ekeldonadis la revuon
- ĉeforgano de IKUE
- plej malnova daŭre aperanta Esperanta revuo
- trifoje akiris apostolan benon de papo

# Katolika movado

- 1905 – unua kunveno de katolikaj Esperantistoj kadre de la Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer; por prediki Esperante dum meso tiam mankis permeso
- 1906 – Peltier predikas en Esperanto dum la Universala Kongreso en Ĝenevo, ricevis apostolan benon de papo Pio la 10-a por sia agado – la benletero estis publike legata de la kongresestro, pastoro Schneeberger, sekvis eksterordinara aplaŭdo de ĉiuj ĉeestantoj

# IKUE

- 1910 – en Parizo okazis la unua kongreso de la katolikaj Esperantistoj, dum ĝi estis fondita *Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista*
- 1992 – la Papa Konsilio por Laikoj agnoskis IKUE kiel internacian organizon de fideluloj
- libro-eldonado, preparo de liturgiaj tradukoj, radio-elsendoj ktp.
- ĉiujaraj kongresoj en diversaj landoj
- inter patronoj ekzemple sankta Maksimiliano Kolbe, kiu subtenadis Esperanton jam dum sia surtera vivo

# Liturgio en Esperanto




Fotografia FELICI – www.fotografiafelici.com

- Esperanto – ununura konstruita liturgia lingvo de la katolika Eklezio
- 1990 – la Kongregacio pri la Dia kulto kaj la disciplino de la sakramentoj aprobis la mestekstojn, tiuj estis libre eldonitaj en 1995
- 1997 – la mestekstojn akceptis Johano Paŭlo la 2-a

# Radio Vatikana

- 1931 – estigo de la radio
- 1977 – komenciĝis elsendoj en Esperanto (1× semajne)
- ekde la jaro 1981 programoj 2×, de 1998 3× semajne
- paŝtista instruo de papo, religia penso, komentoj al evangelioj, Kristana vidpunkto al religiaj problemoj, leterkesto, informoj el katolika Esperantista movado ktp.
- elsendoj kapteblaj en ĉiuj kontinentoj, pere de radio, persatelite kaj lastatempe ankaŭ perrete

# Rilato de papoj al Esperanto 1

- ĉiuj havis pozitivan sintenon
- IKUE atingis la apostolan benon de Pio la 10-a (1906), Benedikto la 15-a (1920), Pio la 11-a (1924)
- 1975 – Paŭlo la 6-a benis la partoprenantojn de la 36-a IKUE-Kongreso
- 1977 – la 37-a IKUE-Kongreso en Ĉenstoĥovo okazis sub aŭspicio de kardinalo Wojtyła, kiu dum ĝi planis ankaŭ servi sanktan meson en Esperanto; lastmomente tamen li devis forveturi pro entombigo de Antoni Baraniak, la ĉefepiskopo de Poznano

# Rilato de papoj al Esperanto 2

- 1993 – apostola beno de Johano Paŭlo la 2-a por la Universala Kongreso en Valencio
- ekde 1994 – salutoj en la internacia lingvo dum la papaj benoj *Urbi et Orbi*
- 1995 – eldonitaj Meslibro kaj Legaĵaro, poste en 1997 solene transdonitaj al Johano Paŭlo la 2-a
- 1997 – Johano Paŭlo la 2-a Esperante benis la anojn de la 50-a IKUE-Kongreso

# Fontoj presitaj


- Korytkowski, Georgo. *Internacia lingva komunikado en la eklezio kaj nuntempa mondo.* Varsovio : Ritmo, 1986. ISBN 83-7013-020-8.
- Lorenc, František Vladimír. *Úplná učebnice mezinárodní řeči dra. Esperanta.* Pardubice : nákladem autora, 1890.
- Matthias, Ulrich. *Esperanto – Das neue Latein der Kirche.* Meßkirch : Armin Gmeiner Verlag, 1999. ISBN 3-926633-39-5.
- Tempczyk, Katarzyna. *Krótka historia volapüku.* Toruń : Towarzystwo Esperanckie „Flamo", 2003. ISBN 83-9032-158-0.

# Fontoj retaj 1

- http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-buch?apm=0&aid=100077&teil=0101&seite=00000001&zoom=1
- http://claudepiron.free.fr/articlesenslovaque/vyzva.htm
- http://commons.wikimedia.org/w/index.php?title=File:Espero_Katolika_(1×1903-04).jpg&oldid=17640418
- http://commons.wikimedia.org/w/index.php?title=File:Espero_Katolika_(4-6%C3%972007).jpg&oldid=17639974
- http://commons.wikimedia.org/w/index.php?title=File:IKUE-Stelo.svg&oldid=17846275
- http://commons.wikimedia.org/w/index.php?title=File:Johano_Pa%C5%ADlo_la_2-a_kaj_la_Esperanta_Meslibro_003.jpg&oldid=17845898
- http://commons.wikimedia.org/w/index.php?title=File:Primera_edici%C3%B3n_de_esperanto.jpg&oldid=17343650
- http://commons.wikimedia.org/w/index.php?title=File:Unua_Libro_fr_001.png&oldid=18883378
- http://commons.wikimedia.org/w/index.php?title=File:Unua_libro_pl.png&oldid=17343648

# Fontoj retaj 2

- http://commons.wikimedia.org/w/index.php?title=File:Unua_Libro.jpg&oldid=17734004
- http://commons.wikimedia.org/w/index.php?title=File:Zamenhof_portrait.jpg&oldid=17851665
- http://cs.wikipedia.org/w/index.php?title=Esperanto&oldid=3675768
- http://cs.wikipedia.org/w/index.php?title=Ludv%C3%ADk_Lazar_Zamenhof&oldid=3644049
- http://de.wikipedia.org/w/index.php?title=Johann_Martin_Schleyer&oldid=54967651
- http://donh.best.vwh.net/Esperanto/EBook/chap03.html#volapuk
- http://e.euroscola.free.fr/unesko.htm
- http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Esperanto&oldid=2211850
- http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=L._L._Zamenhof&oldid=2197531
- http://esperanto.info/en/basic_information/reasons_learn/reasons_learn_esperanto
- http://esperokatolika.org/numerounu/000a.jpg
- http://members.chello.cz/malovec/eco.htm

# Fontoj retaj 3

- http://members.chello.cz/malovec/Komensky.htm
- http://mirrors.creativecommons.org/presskit/buttons/88x31/svg/by-sa.svg
- http://ru.wikipedia.org/w/index.php?title=%D0%97%D0%B0%D0%BC%D0%B5%D0%BD%D0%B3%D0%BE%D1%84,_%D0%9B%D1%8E%D0%B4%D0%B2%D0%B8%D0%BA_%D0%9B%D0%B0%D0%B7%D0%B0%D1%80%D1%8C&oldid=12376396
- http://www.cirkev.cz/eo/bazaj-pregxoj.html
- http://www.esperantic.org/ced/espe.htm
- http://www.esperanto-praha.net/historie.htm
- http://www.esperanto.cz/soubory/Nebezpecnyjazyk.pdf
- http://www.esperanto.fi/ELhistorio.htm
- http://www.esperanto.pl/page.php?tid=1331
- http://www.ikue.org/asocio.html
- http://www.ikue.org/info/eo.pdf

# Fontoj retaj 4

- http://www.ikue.org/sanktuloj/kolbe.htm
- http://www.medy.cz/Brno-Esperanto
- http://www.radiovaticana.org/esp/index.asp
- http://www.vatican.va/news_services/radio/multimedia/storia_ing.html
- http://www.vialucis.cz/kapitola19.htm

# Kolofono

- Aŭtoris Petr Adam Dohnálek
- Reviziis Daniel Mrázek, Vitor Luiz Rigoti dos Anjos, Katarzyna Tempczyk
- Mem-eldonita en Fulnek (Ĉeĥujo), 2009
- 2-a korektita eldono
- URN:NBN:cz-nk20093269
- La dokumento estas liberigita sub la kondiĉoj de la permesilo *Creative Commons Attribution-Share Alike 3.0 Unported* (la plena teksto atingeblas enrete je la adreso *http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/legalcode*)